No. 11 (1954)

# Ekonomia Egaleco

ORGANO DE „INTERNACIA ASOCIO BELLAMY
Jarabono 7 intern. resp. kuponoj.
Sidejo: Koningstr. 188, Beverwijk, Nederlando.

## Bellamy kaj Esperanto!

La jam dum pluraj jaroj ekzistanta Internacia Unuiĝo Bellamy (I.V.B.), kies sidejo estas en Nederlando, ĉiel klopodas efektivigi la Bellamy-ekonomion. Por siaj internaciaj interrilatoj ĝi komence uzis la anglan, francan, germanan kaj hispanan lingvojn. Spertinte multajn malfacilajojn, ĝi fine decidis utiligi Esperanton kaj starigis superan instancon, la „Internacia Asocio Bellamy" (I.A.B.)!

Same kiel Dr Zamenhof, estante knabo, cerbumis pri la eblo por solvi la multlingvecon, kiun li opiniis ĉefa kaŭzo de homa miskompreno kaj sufero, Edward Bellamy junaĝa jam pensis pri solvo de la sociaj problemoj. Same kiel Zamenhof proprasperte kaj okule povis rigardi la terurajn sekvojn de la multlingveco en Bjelistok, Edward Bellamy en grandaj urboj konatiĝis kun la granda senkompateco de tiuj, kiuj per siaj riĉo kaj privilegioj regis super la senhavuloj. Li konsciiĝis, ke ĉie en la mondo regas la sama mizero, kaŭzata de la malegaleco en la materia vivo de la homaro, kaj li decidis partopreni la batalon kontraŭ tiu maljusto. Tiucele li verkis romanon kiu donas logikan bildon de sociaj cirkonstancoj, kiaj ili estos, kiam la demokrata elemento estos plene triumfinta, kiam ne plu ekzistos la materia malegaleco inter la homoj. La libro donas al ni bildon pri la socio en la jaro 2.000 kaj nomiĝas „Looking backward" (Rigardante malantaŭen); rigardo el la jaro 2.000 al la jaro 1887. Ĝi montras al ni la konstrastojn inter la solidareca socio kaj la kapitalisma.

Ne nur sur ekonomia, sed ankaŭ sur teknikaj terenoj liaj kvazaŭ profetaj eldiroj, montriĝis trafe ĝustaj. Radion kaj televidon, nun tre simplaj aferoj, sed por la tiutempa generacio t.n. „utopioj", li profetis. Ankaŭ la „Internacian lingvon" li ne forgesis! En sia libro li igas klarigi la reprezentanton de la nova socio: „Vi certe komprenos, ke la internacia lingvo ne malmulte kontribuis por efektivigi la veran interfratiĝon"!

Post apero de sia „Esperanto" Zamenhof verkis „Lingvaj Respondoj". Bellamy faris same. Post apero de sia „Looking backward" li aperigis „Equality" (Egaleco).

Kia sameco! Du homoj, ne koninte unu la alian, laborinte sur tute malsamaj terenoj, sed klopodinte al unu kaj sama celo: la feliĉo de l' homo! En 1887a Zamenhof per sia „Esperanto" de el Polio atakis la multlingvecon, kaj en la sama jaro Edward Bellamy per sia „Looking backward" de el Ameriko atakis la ekonomian ĥaoson!

Esperantistoj, helpu nin disvastigi internacie la Bellamy-ekonomion. Konsciu pri tio, ke eĉ la plej bonaj celoj fine nepre frakasiĝos sub la hodiaŭa absolute malhominda ĥaossistemo ekonomia! La mondĥaoso ĉiutage, eĉ ĉiuminute pligrandiĝas; disfalon de la kapitalisma socio ĉiu infano povas antaŭvidi. Urĝas la tempo por komune konstrui novan, pli belan mondon!

### Kion celas Internacia Asocio Bellamy?

✶

**La I.A.B. prezentas tute sanan socialan bazon („Ekonomia egaleco por ĉiuj") kiel naturan garantion por la observado de la pure etika direktivo PERSONA LIBERECO DE ĈIUJ!**

**Ĉe tio ĝi eliras de la centra ideo de socia solidareco, kiu nuligas maldecajn kontrastojn kaj transpontas naturajn diferencojn.**

**La movado tial NE okupas sin per klasbatalo kaj partipolitiko, ĉar batalo elvokas reakcion aŭ kondukas al kompromisoj, kiuj kontentigas neniun, tiel ke jam tuj ĉeestus ĝermo de novaj konfliktoj.**

**La I.A.B. volas loki en la fokuson de la publika interesiĝo la fakton, ke la hodiaŭa socia sistemo estas el scienca kaj morala vidpunktoj netenebla kaj indiki la fundamentojn por socio, en kiu oni povos vivi vere en libereco.**

## La amara pilolo

En malnova libro mi legis: „La homo estas la unua estajo kun racio". Alia verkisto diras, ke la homo diferencigas sin je la besto pro sia racio.

Kiel homo oni vere fierus pri tio. Ĝis kiam vi legas en via jurnalo, en artikolo pri la „Porinfanahelpkaso de la U.N.O.": „Pro tuberkulozo ĉiujare mortas 5.000.000 homoj, **nur pro tio ke la kuracigo estas tro multekosta".** Kaj alian matenon vi legas en la jurnaloj, ke ĉi tie (Nederlando) pereis militaeroplano kun do homoj kaj ke en Anglio samtempe pereis eĉ kvar da tiuj bruegiloj, plus tri homoj. Kaj tiam vi pensas pri ĉiuj tiuj aliaj mortigiloj, restantaj en la aero.... Estu tiel.... kuracigilojn kaj militaeroplanojn vi je na povas aĉeti per la sama monsumo, ĉu ne, kaj sekve...... tiuj 5.000.000 malsanuloj do viktimiĝu, kun siaj „racio" kaj ĉiom......

En Aŭstralio proksimiĝas la plej grava krizo depost tridek jaroj, ĉar.... je la jarfino oni havos restajon de 60.000.000 buŝelojn da greno.

En Kanado la **„nubo"** estas multe pli **„nigra"**, ĉar tie oni el 1952a ankoraŭ havas 362.700.000 buŝelojn, dum oni tie en 1953a **„estis punata"** per la dua plej amasa rikolto el la historio: 614.000.000 buŝeloj.... Jes, rilate al tia abundo oni povus diri: **„malfeliĉo ĉiam venas kun frato!"....** Ke ĉiujare 78.000.000 homoj mortas pro malsato.... ho, kiu povas ŝanĝi tion.... ili ja ne havas dolarojn aŭ funtosterlingojn por pagi?....

Se temas pri „racio": ĉu iam vermo mortmalsatis pro la **tro-grando** de sia pomo???

Goethe diris: „Estas sur la tero sufiĉe da pano por ĉiuj homoj".

Mi aldonas:

„Ĉu la kaduka profitsistemo
tiam baru al ni la konsumadon?"

C.O.

# Procente doni monon kontraû progreso

(Edw. Bellamy, „Ekonomia Egaleco" ĉap. 27a. Ekstrakto el ekzameno).

★

„Nun, Florence", diris la instruisto, „ni traktos la lastan punkton de niaj prikonsideroj pri la ekonomia sistemo de niaj prapatroj, nome: Ilian malamikan sintenon kontraŭ eltrovoj kaj plibonigoj. — Estis nia malŝatata devo prilumi ĉion, kio klare pruvis, ke niaj respektindaj prapatroj estis mirige blindaj koncerne la veran karakteron kaj la sekvojn de sia priekonomia aranĝo.
Kaj nenio tiom elokvente montras la fakton, ke malegala privatposedo ne povas ne bari la vojon al necesaj reformoj ol la ekzemplo, kiun ni nun prezentos. Estas vere, ke ili sincere opiniis, ke ĝuste ilia sistemo favoris la naskiĝon de inventoj kaj ke tio estis tiom granda avantaĝo, ke la enŝteliĝintaj falsaj elementoj ne plu vidiĝis. — Kion vi al tio povas aldoni?
„Estas fakto, „respondis la knabino", ke la intereso de la kapitalisto, kiu procente donis sian monon al iu ajn entrepreno, postulis ke tre gravaj reformoj ne okazu, eĉ se ili estus en la intereso de la komunumo".
„Vi bonvolu klarigi tion, komparante la nunan situacion kun la antaŭa privatsistemo".
„Nia sistemo estas ekzakta tuto, tio estas:

*Kion VI FARAS por ni?*



Neniu individuo povas profiti ion, kio estas kontraŭ la intereso de la tuta popolo. La sola celado estas: akceli la prosperon de ĈIUJ. Ni havas diversajn kaj diferencajn okupojn, kies celo estas: Laboro por la ĝenerala bonstato. Ni povas entuziasmiĝi pri nia propra metio aŭ ofico, sed tio povas esti nur privata sentimento, ĉar nia ekonomia sistemo estas tute sendependa de niaj okupoj, kies ajn. Ni ĉiuj ĝuas nian porcion el la tuta produktaro".
„Kiun influon nia unika ekonomia sistemo havas rilate nian sintenon je inventoj kaj reformoj sur ekonomia tereno?"
„Ni salutas ilin kore; kial ne? Ĉiu plibonigo kompreneble kontribuas al bonstato de ĉiu naciano. Kiam hazarde oni eltrovas ion sur la tereno de nia metio kaj eble tute malnecesigas nian laboron, ni perdas neniom. En tiu okazo ni povus iom bedaŭri niajn kutimojn, rutinon, sed ne pli. Ĉiuj estas servantoj de la ŝtato, do estas la devo kaj la intereso de la ŝtato havigi al ni alian taskon, kiam pro reformo aŭ invento nia laboro fariĝas superflua, despli kiam tiu reformo kontribuas multon al la ĝenerala bonfarto. Neniel do nia ekzistorajto kaj ekzistoeblo endanĝeriĝas. Konklude: ĉiaj plibonigoj de labormetodoj priekonomiaj estas beno por ĈIUJ. La inventinton donas al ni donacon, kiu alportos lukson kaj ŝparas laborforton; ne mirige, ke la danko de l' popolo estas rekompenco, kiu povus enviigi ĉiun bonfaranton".
„Nun, Florence", diris la instruisto, klarigu al ni kiel ĉiuj tiuj privataj interesoj financaj el la profitsistemperiodo kontraŭis la priekonomiajn reformojn kaj la eltrovojn".
„Ni jam diris", daŭrigis la knabino, ke ĉies bonfarto tute dependis de la ensocia posteno, kiun oni havis. Al kapitalisto ĉiam minacis la danĝero perdi sian kapitalon; la laboristo, kies „kapitalo" estis lia akirita lerteco, daŭre minacis la samo. La kapitalisto kiel la metiisto, la labordonanto kiel la laborulo, ĉiuj dependis nur de la propra posteno. Novaj ideoj, inventoj, malkovroj ĝenis la ordinaran antaŭan iradon de la afero kaj detruis la ekonomian bazon, sur kiu staris tiuj laboroj pripostenaj. Estis granda domaĝo al tiuj, kiujn trafis la sorto. La kapitalisto perdis sian kapitalon, la laborulo siajn vivrimedojn. La socio neniel kompensis al la kapitalisto, nek al la laboristo tiun domaĝon, kiom ajn granda la profito de tiuj inventoj k.t.p. estis. La sekvo estis, ke plej bonaj eltrovoj formis katastrofon por tiuj, kies taskon en la socia vivo ili forprenis, superfluigis. La fabrikistoj timis ĉiujn inventojn, kies apliko en unu tago povus degradi iliajn multekostajn maŝinojn ĝis rustajoj. Laborista inkubo estis la timo, ke iun tagon oni eltrovus maŝinon, kiu forrabus la panon de iliaj idoj, tial ke la labordonanto ne plu bezonus lian laborforton. La ŝpinmaŝinoj prenis la lokojn de la radŝpiniloj kaj la malsato konkeris la anglajn vilaĝojn! La fervojo anstataŭis la diliĝencon. Centoj sur montetoj konstruitaj urbetoj kadukiĝis, dum novaj ekestis en la valoj. La kamparanoj en la oriento paŭperiĝis pro novaj kulturmetodoj en la okcidento. Petrolo forpelis balenoleon kaj multnombraj marhavenoj velkiĝis. Karbon kaj feron oni trovis en la sudo kaj la herbo kreskis en la stratoj de antaŭe florantaj industriurboj en la nordo.
Elektro sekvis vaporon kaj la fervojakcioj senvaloriĝis. — Sed, kial daŭrigi la liston, kies fino ne estas videbla? Ĉie oni konstatis la samon: ĉiu grava eltrovo kaŭzis al parto el la popolo grandegan domaĝon. Niaj prapatroj pagis ĉian progreson per nekalkuleblaj bankrotoj, armeoj da vagabondiĝintaj senlaboruloj kaj maro da mizero sur vasta tereno. Kiam oni iom estis forgesintaj la industrian transiron, aŭdiĝis el la buŝoj de tiutempaj oratoroj la pataosa verso:

„La Paco ne malpli pagas
siajn venkojn ol la milito!"

(el la nederlanda trad.: Fodoso).

## Kelkaj komunikoj

Kun granda bedaŭro ni devas komuniki al niaj legantoj, ke la stoko de la esperanto-eldono „Rigardante malantaŭen" estas elĉerpita. Kiam nova eldono aperos? Simpla demando, malfacila respondo!
Esperanto-eldono de „Equality" (Egaleco) ne ekzistas. Ni jam tradukis ĝin en esperanto, sed pri aperigo ne ankoraŭ kuraĝas eĉ songi!
Por transponti ĉi tiujn mankojn, ni aperigis vere tre interesan broŝuron „Liberigo de Timo kaj Mizero", kiu koncize sed klare kaj konvinkige instruas al vi kiel trovi Feliĉon, Bonfarton kaj Pacon. Prezo: 2 intern. resp. kuponoj.
Krom tio ni eldonis ilustritan faldfolieton „Ekonomiaj Faktoj en dudek ok bildoj". Ĉi tiu folieto klarigas la ĉefajn punktojn pri la tutmonda ekonomia problemo kaj la solvo per 28 sinsekvaj alineoj, ĉiu kun frapa simbola skizo.
Prezo: s e n p a g e !

# Ĉe la barbiro

Ni, viroj, estas multekostaj kreitajoj, i.a. pro tio, ke ni tiom ofte vizitas la barbiron, almenaŭ se ni pli ŝatas glatan vizaĝon ol la portadon de respektinda barbo. Krome, por nia defendo, ofte la edzinoj k.s. devigas nin esti glatvangaj. Vi komprenas, ĉu ne?
Ĉar mi estas tre mallerta, do prefere ne mem trenaĉe skrapas mian vizaĝon, ankaŭ mi ofte sidas ĉe la barbiro.
Barbiroj estas majstroj, ne nur en la manipulado de akregaj razotranĉiloj, sed ankaŭ en la arto fluigi interparolojn. Kiam temas pri inteligenta razisto, kiel en mia kazo, la paroloj koncernas ne nur la veteron, sed ĉiajn ajn interesajn aferojn. Ke tio povas esti tre lerniga, montros al vi ĉi suba raporto pri unu el miaj vizitoj ĉe la barbiro.

S.: Matenon, Sro. Akra. Hallo, Petro, mi longe ne vidis vin!

A.: Matenon, Sro. Senbarba.

P.: Matenon, Cor. Jes, knabo, mi estas tre okupita lastatempe. Mia komercado tiom postulas mian atenton, ke mi nur apenaŭ havas tempon tondigi la harojn.

S.: Vi do similas al nia tranĉil-artisto, ĉu ne, Sro. Akra? Laboradu, laboradu, kaj krome atentu nenion en la mondo.
La razisto saĝe silentas.

P.: Aha, ĉu vi denove estas en bataliro, maljuna utopisto? Ĉu ankoraŭ ĉiam vi ne sukcesis ekkompreni, ke en nia mondo ĉiu zorgu por si mem, kaj — se vi deziras — nur Dio por ni ĉiuj?

S.: Mi tre bedaŭras, Petro, sed tion mi, eĉ ĉe kiom eble plej granda penado, ne povas kompreni, domaĝe.
Atentu — estas via vico.
Sed, ĉu vi jam foje pripensis ke vi, zorgante ekskluzive pri vi mem, aŭtomate malzorgas pri la interesoj de aliaj homoj?

P.: (sub la tenĉilo): Nu??

S.: Tio ja ne estas bagatelo. Jam dum tre multaj jaroj la homoj opinias, ke oni prizorgas la ĝeneralan bonstaton plej efike, kiam oni ĉasadas egoisme sian propran prosperon. Dum oni klopodas riĉiĝi sin (ĉar tion oni nomas prospero aŭ bonstato), la tuta mondo refalas en malriĉecon.

P.: Sensencaĵo!

S.: Tamen ne! Ĉiuj atentas siajn proprajn interesojn, tute private, kaj ne konsideras la interesojn de la aliaj homoj. Aŭ, pligrandskale: ĉiu popolo faras tiel kaj la rezultato estas milito. Ĉu tio riĉigas la mondon aŭ malriĉigas? Kaj, ĉu eble vi ĝuis pro la pasinta milito?

P.: Komprenebe ne!

S.: Do ni estu kleraj kaj evitu tiajn „festojn" por la estonteco, kaj por tio necesas, ke ni observu kaj servu ankaŭ la interesojn de la aliaj homoj, la aliaj popoloj!

P.: kaj A. (parolhoreto!): Kiel vi volas atingi tion?

S.: Per instalo kaj praktikado de pli hominda sistemo soci-ekonomia. Tio unualoke!

P.: Mi jam antaŭsentas. Per Bellamy-sistemo, ĉu ne?

S.: Jes, kaj pri la vojo irenda vi povas legi en la broŝuro „Liberigo de Timo kaj Mizero" multajn interesajn detalojn.
Intertempe ne haltigu la laboron, Sro. Akra, ĉar alie gromblos mia mastro.

C. SENBARBA.

KELKAJ KAŬZOJ DE NIA MALSANA HOMSOCIO




La kuracilo: „Forigo de tiuj ĉi erarigajoj"

# Konkurenco

Jansen kaj Smit estis konkurantoj, t.e. ili havis samajn metiojn, samajn bezonojn kaj samnivelajn metikapablojn.

Iun tagon Jansen ricevis etan heredajon kaj kiel prudenta homo li investis ĝin en sia entrepreno: li aĉetis maŝinon. Per tre alloga reklamilo li komunikis al siaj klientoj (ankaŭ al tiuj de Smit!) pri la ebloj por pli bona riparado, pli rapida servo kaj.... pli malalta prezo. Tiel komenciĝis.

Post unu jaro, Jansen aĉetis ŝarĝaŭtomobilon. Smit iomete malvigliĝis. Sinjorino Jansen pli kaj pli vidiĝis en aristokrataj rondoj. Sinjorino Smit restis kia ŝi estas.

Du jarojn poste Jansen aĉetis duan maŝinon kaj dungis serviston. Smit maldungis du kaj lia vizaĝo spegulis la zorgojn.

Kvin jarojn poste. Jansen aĉetis luksan aŭtomobilon, funkciigis trian maŝinon kaj dungis du laborulojn. Smit maldungis kvin.

Post sep jaroj. Sinjoro Jansen fariĝis fabrikanto kaj havis ĉiujn klientojn. Smit bankrotiĝis kaj senlaboriĝis, kune kun la duono de sia antaŭa dungitaro. La alia duono laboris ĉe Sinjoro Jansen.

Sinjorino Jansen dungis kuirejistinon.
Sinjorino Smit penadis pri kromenspezoj.

Kiam la entrepreno de Sinjoro Jansen jubileis, „Sinjoro" aranĝis festtagmanĝon por la tuta dungitaro, ĉar li estas bona estro. Kaj la Pastro ankaŭ ĉeestis, ĉar Jansen estis pia homo kaj konsideris siajn riĉajojn nur kiel „pruntita".

Kaj kiam la Pastro antaŭ la tagmanĝo preĝparolis, li atentigis pri la kresko de la entrepreno kaj pri ĉiom la bono, kiun Jansen danke povis ricevi kiel rekompencon por fervoro kaj energio.

Rigardante al la montoj, oni facile forgesas la valojn. La Pastro tiel dankis pro prospero, kiu estiĝis pro malprospero de aliaj, li dankis pro bonfarto, kiu baziĝis sur malriĉo de aliaj. Tiel li senkonscie dankis pro la malsukceso de Smit, pro la malĝojo de ties edzino, pro la mizero de ties maldungita servistaro. Sed li rigardis nur al la montoj.

Kaj en ĉi tiu socio la riĉo de unuopuloj estas bazita sur la malriĉo de multaj, tiel ke prospero kaj mizero nedisigeble estas ligitaj kiel montoj kaj valoj.

Kiu festas la venkon, festas ankaŭ la malvenkon. Kaj tiel ni en ĉi tiu socio ofte senkonscie estas kruelaj en niaj ĝojoj, kruelaj en niaj dankesprimoj.

Sed venos nova tago, kiu donos lokon al la Amo por la kunulo, vera sociordo, en kiu estos agnoskita la **Rajto** de kaj por ĉiuj.


C.O.

**EKONOMIO KAJ FINANCA PROFITO estas kontraŭaj konceptoj.**

# MAŜINOJ FLANKENŜOVAS LA HOMON

En la evoluado de la socio la homa laboro estis pli kaj pli anstataŭata, komence de besta laboro, poste de maŝina.
Tiun ŝanĝon forte akcelis speciale la 19-a jarcento, kiam pro la eltrovo kaj plibonigo de la vapormaŝino la maŝina produktmaniero konkeris la ĉefan lokon.

Vira forto: Besta helpo: Maŝinoj:




La anstataŭigo de homa kaj besta laboroj per meĥanika.

Tiu ĉi desegno ilustras kiel radikale ŝanĝiĝas la kompono de la tuta kvanto da laboro (esprimita en ĉevalforto-horoj), dediĉita en Usono al la produktado, proporcie kun la priregado de la energio. Por doni ioman impreson pri la signifo de la forte altiĝinta produktiveco, kiu rezultis el tio, servu kelkaj detaloj el Usono. En 1850 necesis por la akiro de nacia enspezo de ĉirkaŭ 6 x $10^9$ dolaroj: proksim. 27 x $10^9$ vir-horoj. En 1940 bezoniĝis proks. 105 x $10^9$ vir-horoj ĉe nacia enspezo de proks. 102 x $10^9$ dolaroj.
Per kvarobligo de la vir-horoj la nacia enspezo do povis esti 16-obligata en 90 jaroj. Tio estis ebla nur pro la tre multiĝinta laborproduktiveco pere de meĥanikigo.
Se en 1940 la laborproduktiveco estus restinta samnivela kiel en 1850 oni bezonus anstataŭ 63 milionoj da laboristoj dejorantaj dum proksimume po 47 horoj semajne, pli ol.... 175 milionoj da laboruloj! Tiu nombro estas multe pli granda ol tiu de la tuta loĝantaro de Usono (132.000.000 en 1940). Tio do signifas ke la pliiĝinta produktiveco, sekve de la meĥanikigo, fakte faris la laboron de 175 — 63 = 112 milionoj da laboristoj SUPERFLUA.
Kiam oni do parolas pri la demando ĉu maŝinoj, „nutrataj" per fosiliaj brulajoj (karbo, oleo), faras homan laborforton superflua, tiam povas esti utile pensi pri ĉi tiu kalkulado.

**Noto Red. Egaleco:** Ĉi tio estas eldiro, tute alia ol tiu, pri kiu multaj ekonomiistoj ankoraŭ ĉiam obstine persistadas, nome ke la produktado kaj riparado de maŝinoj siavice kreas plenan laborokazon por la laboristoj, kiujn „lokaŭtis" tiuj maŝinoj.
Krome ni atentigas pri la grandaj malfacilajoj pro la meĥanikigo aŭ reorganizo de eksigitaj laboristoj 40-60 jaraj, por lerni ankoraŭ tute alian profesion kaj akiri en ĝi saman vivonormon kiel ili kutime havis. SE ili trovas laboron ili ricevas, kiel montras la faktoj, ĝenerale multe malpli grandan aĉetpovon. Oficiala enketo povus publikigi en ĉi tiu kadro multajn tragikajn kazojn. (Speciale dum la periode revenantaj krizoj de liberalekonomia sistemo).
La rezultato de la teknika progreso do estas ke la produktado, necesa por la nacia prospero, bezonas ĉiam malpli da homaj laborfortoj. Tiuj eliminitaj laboruloj tamen pluekzistas kiel konsumantoj kaj al ili devas esti donata la necesa aĉetpovo (mono).
**Unu el la plej gravaj konsekvencoj de la pliiĝinta produktiveco ĉe malpli granda bezono de homa laboro estas, ke la suma prezvaloro de la produktitaj konsumvaroj estas pli alta ol la tuta sumo de la enspezoj de tiu parto el la konsumantoj, kiuj bezonas tiujn varojn.**
Kiam plue oni pripensas kiel en kelkaj partoj de nia tero produktiĝas kaj konserviĝas tiom da nutrajoj, ke oni ne plu scias kion fari per ili, dum en aliaj regionoj ekzistas permanente nutraj-manko, oni ne povas ne konstati mankon de taŭga organizado.
Krom malŝparado de krudmaterialoj, kiuj nur parte estas uzataj por fabrikado de bonkvalitaj artikloj kun longa uzodaŭro, ni menciu ankoraŭ fonton de energi-malŝparado, nome la reklamon. Tuj kiam la varoj, produktitaj interne de la fabrikmuroj laŭ taŭga organizo kaj ĉe kiom eble plej ŝparema energi-uzo, aperas „en la merkato" komenciĝas la misuzo de homa kaj aliaj energioj. La reala aĉetpovo de la konsumantoj ja ne sufiĉas por akcepti ĉiujn produktojn kaj sekve la vendistoj komencas inter si la reklambatalon, en kiu ĉiu klopodas altiri al si kiom eble plej multe da tiu aĉetpovo.
Ankaŭ ĉi tie montriĝas ke la organiza kapablo de la homaro pli evoluis sur la tereno de produkta-ekonomio ol sur tiu de socia ordigo kaj prosperarangô.

Dr. E. H. F. v. d. LELY.
(Docento ĉe la Internacia Seminari, Hago). (El artikolo en „Welvaart voor Allen", (Prospero por ĉiuj), organo de la Nederl. Bellamy-movado).
Trad. C. Joon.

# EKONOMIO en NUKSOŜELO

Jen, kio okazas nun:

1. ELIMINO de homa laborforto el la produktado pro la daŭre pliiĝanta meĥanikigo.
2. SEKVOJ: plia produktado de konsumvaroj, sed.... manko de aĉetpovo ĉe la konsumantoj de tiuj varoj.
3. REZULTO: estiĝas vendokrizo en la konsumvaro-industrioj, kaj tial malpli da aktiveco en la pezaj industrioj, la konstrusekcio, ktp. ktp. (La t.n. ĉenreakcio-teorio de Colin Clark).
4. SEKVOJ: limigo de produktado aŭ neniigo de konsumvaroj, bankrotoj de multaj entreprenistoj kaj ruinigo de malgrand-ŝparantoj aŭ transsalto al armilindustrio por eviti amasiĝon de nevendeblaj konsumajoj.
5. KONKLUDO: ĉe (latenta) eblo de abundo per meĥanikigo.... pliiĝanta malriĉiĝo de la plimulto el la konsumantoj kaj kreskantaj ŝancoj por revolucio, diktatoroj aŭ milito.

BELLAMY PREZENTAS SOLVON DE TIU PROBLEMO.

6. Pliigo de la produktado ĝis plena kapablo, ĉe kio la kontraŭvaloro de la ĉiujare produktitaj konsumvaroj estas tute eldonata al la konsumantoj de tiuj varoj.
7. TRI KONDIĈOJ: (a) la pagorimedo de la konsumantoj estu valida dum nur unu jaro, (b) ĝi servu ekskluzive por la aĉetado de konsumvaroj, kaj (c) ĝi povu esti uzata nur unufoje.
8. REZULTO: ĉiuj varoj povas esti vendataj kaj ne plu estos necese malpliigi la produktadon, neniigi la stokojn aŭ transiri al armilproduktado.
. SEKVOJ: ĉe pli grandskala produktado, dank' al la teknika progreso, estos eble disponigi pli multe da mono al la konsumantoj, pro kio vendokrizo malebliĝas.
10. KONKLUDO: Tiam la maŝinoj donos pli altan vivonormon kaj pli da libera tempo al la **tuta popolo.**

T.S.

**Amas-senlaboreco estas la neevitebla konsekvenco de ekonomio, kiu malatentas la ekvilibron inter produktado kaj konsumado.**